


HUNGARA FERVOJISTA MONDO



Esperanto, internacia lingvo



Vicprezidanto de HEA alparolas dum la ĝenerala kunsido de HFEA

1

2013

57-a jarkolekto



HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Revuo de la Fervojista Esperanto-Movado
en Hungario
Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.

Respondeca redaktoro:

István Gulyás

Eldonas:

Hungara Fervojista Esperanto-Asocio
Hungara Sekcio
de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio
Poŝta adreso: HU-1155 Budapeŝt
Rákos u. 98. I/9.

Aperas kvaronjare

Abonprezo: al hungara adreso: HUF 1500
al eksterlanda adreso: EUR 10

*

MAGYAR VASUTAS VILÁG

A magyar eszperantista vasutasok
központi lapja

Felelős szerkesztő: Gulyás István

Kiadásért felelős:

A Magyar Vasutas Eszperantó Egyesület
Misztótfalusi Nyomdaipari Kft.

Felelős vezető: Soósné Pálfalvai Adrienn

ISSN 0230-323x

ENHAVTABELO

2-a kovrilpaĝo: **I. Gulyás:** EĤO

- 1 **I. Gulyás:** Niaj agadoj
- 5 **I. Gulyás:** El la vivo de niaj Fakgrupoj
I. Sutka : Kiel propogandi E-n?
- 6 **M. Zuberecz:** Eksterlandaj gastoj
- 7 **J. Halász:** Festotago de Zamenhof
- 8 **J. Patay:** Omaĝo al...
- 11 **I. Domokos:** Necesece de Donát Bánki en
Szigethalom: apogo de Esperanto
- 14 **J. Patay:** Pietate ni primemoras
- 16 **J. Patay:** Spiritaj desertoj (Furiozulo...)
F. Csaba: Naŭ juglandoj
I. Sutka: Taksio-aventuro

EĤO

En HFM n-ro 3/2012 mi skribis artikoleon pri la apero de libro, fare de D-ro Imre Ferenczy, kaj post kelkaj semajnoj D-ro Ferenczy ricevis reagon pri mia artikolo de Osmo Buller, la ĝenerala direktoro de UEA, jen:

„Kun intereso kaj granda plezuro mi legis en n-ro 3/2012 de „Hungara Fervojista Mondo” la enkondukon de nia komuna amiko István Gulyás, kiu en trafa maniero prezentis vian libron „Mi estis fervoja kuracisto”.

Mi deziras elkore gratuli vin pro via verko, pri kiu s-ro Gulyás donis tre interesan priskribon kaj certe plenrajte tre favoran opinion. Mi tute subskribas lian deziron fine de la teksto, nome ke via verko estu tradukita en Esperanton, por ke ankaŭ alilandaj esperantistoj, ne nur fervojistaj, povu legi ĝin. Mi scias, ke estas facile esprimi tian deziron, sed la tradukado estus granda kaj temporaba laboro. Kune kun samideano Gulyás mi tamen volas esti Esperanto ankaŭ tiurilate!”

En HFM n-ro 4/2012 mi donis intervjuon al D-ro József Halász en la kadro de la riportserio titolita „13+1 demandoj”. Post kelkaj tagoj mi ricevis reagon ankaŭ de Osmo Buller pri tiu artikolo, jen:

„Hodiaŭ mi legis vian intervjuon en n-ro 4/2012 de „Hungara Fervojista Mondo” kaj decidis tuj skribi al vi por danki kaj gratuli vin pro la neimageble interesa enhavo! Temas pri dokumento kun amaso da gravaj informoj, kiuj koncernas ne nur vian personan „vivaventuron” sed ankaŭ pli vaste la Esperanto-movadon, fervojistan kaj ĝeneralan. Movadaj historiistoj ankoraŭ ĉerpos valorajn informojn el viaj respondoj”

Mi povas rimarki, ke pro tiuj reagoj mi pripensis, ke estas grava afero serioze kaj efike agadi en la movada vivo, kaj verki artikolojn en nia faka revuo. Tiu signo donas al mi forton kaj kuraĝon plu labori en la kadro de Esperanto.

István Gulyás

NIAJ AGADOJ

Alvenis la nova jaro, kaj – laŭ mia opinio – la prezidanto de la asocio devas taksati la movadan agadon, la rezultojn kaj malsukcesojn de la pasinta jaro, kaj formuli la plej gravajn taskojn por la nova jaro. Kiel la prezidanto de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio, en ĉiuj jaroj mi faris tion, kaj tiujn taksajn artikolojn mi aperigis en nia faka revuo „Hungara Fervojista Mondo” (HFM). Mi multe pensadas, ĉu estas sukcesa fari tion? Ĉu ekzistas kelkaj hungaraj fervojistaj esperantistoj, kiuj tralegas tiujn artikolojn? Mia karmemora antaŭulo D-ro István Bácskai diris al mi, kiam mi demandis lin pri tiu penso: „Se nur unu membro de nia asocio legas la artikolon, se nur unu persono spertas niajn agadojn, jam nia aktiveco ne estas vana”. Do mi daŭrigas tiun tradicion, kaj en tiu ĉi artikolo mi taksas la agadon de la pasinta jaro, kaj mi formulas la taskojn por la jaro 2013.

En la fino de januaro okazis la ĝenerala kunsido de nia asocio. Dum la kunsido partoprenis preskaŭ ĉiuj reprezentantoj de la fakgrupoj kaj membroasocioj, kaj ĉeestis la du vicprezidantoj de la Hungaria Esperanto-Asocio, eĉ tri membroj de la Danubkurbiĝa Esperanto-Grupo, kiuj organizas la ĉijaran Landan Amikan Fervojistan Esperanto-Renkontiĝon.

La sekretario de nia asocio konigis la ĉeestantojn la raporton de la estraro pri la 2012-jara agado. Laŭ tio la asocio havas 467 membrojn, inter ili 97 emeritulojn, 21 lernantojn kaj 195 protektantajn membrojn. Bedaŭrinde nur 20 IFEF-membroj troveblas en la membraro, 6 fakdelegitoj kaj 6 individuaj membroj de UEA. Fakgrupoj ekzistas en la urboj Budapest, Debrecen, Győr, Kiskunhalas-Kelebia, Nyíregyháza, Pécs, Szombathely, Zalaegerszeg, kaj membroasocioj en Miskolc kaj Tata. Laŭ la raporto ĉe la fakgrupoj kaj membroasocioj okazis vigla kaj regula klubvivo kun pluraj lingvokursoj, fakprelegoj, raportoj, fakaj kaj turismaj ekskursoj kaj aliaj programoj. Okazis kelkaj ekspozicioj pri la movadaj agadoj kaj pri aliaj temoj, inter ili la amatoraj belartistoj de Tata

faris plurajn ekspoziciojn dise en la lando, eĉ ankaŭ eksterlande. Preskaŭ ĉiuj fakgrupoj kaj membroasocioj havas internaciajn interrilatojn. Do la raporto de la estraro konstatis, ke – malgraŭ la malbona ekonomia situacio, la rapida maljuniĝo de nia membraro, la manko de gejunuloj en nia movada vivo, ktp – la hungaraj fervojistaj esperantistoj agadis rezultohave, kaj ili plenumis la entreprenitajn taskojn laŭ nia laborplano.

La partoprenantoj de la ĝenerala kunsido elektis 5 deputitojn por la Hungaria Esperanto-Asocio, kaj komitatanon por IFEF. La prezidanto de la asocio informis la deputitojn pri la situacio de la landa kaj internacia Esperanto-movadoj, kaj pri la roloj de la hungaraj fervojistaj esperantistoj en la kadro de la Esperanto-agado. Estis interesa momento dum la kunsido, kiam la organizantoj de la ĉijara Landa Amika Renkontiĝo raportis pri la preparlaboro de tiu renkontiĝo, ili detale konigis la programon, la kostojn kaj la ceterajn aranĝaĵojn, eĉ ili disdonis la invitilon, aliĝilon kaj informilojn pri ceteraj informoj al ĉiuj ĉeestantoj.

La deputitoj de la kunsido per valoraj kaj aktualaj alparoloj kaj proponoj altigis la nivelon de la ĝenerala kunsido. Fine la deputitoj akceptis la raporton de la estraro, la buĝeton kaj la laborplanon.

Mi devas mencii, ke nia asocio havas bonan rilaton kun la landa FISAIC-organizaĵo (VOKE), kiu helpas al ni kaj morale kaj finance. Ĉiujare ni donas al VOKE detalan informon pri nia laboro kaj pri financaj aferoj, eĉ raporton kun fotoj pri nia partopreno en la kongresoj, estrarkunsidoj kaj aliaj Esperanto-eventoj por ke tiu detale informiĝu pri nia laboro kaj rezultoj.

Ankaŭ estas bona afero, ke nia asocio aktive partoprenas en la laboro de HEA kaj de aliaj Esperanto-organizaĵoj. La Hungaria Esperanto-Asocio kontinue observas kaj atente rekonas nian agadon, eĉ akcelas tion, ja por la ĝenerala kunsido ili donis elegantan salonon en la rezidejo de la hungaraj esperantistoj.

En la jaro 2012 ni travivis multajn interesajn kaj ĝojplenajn eventojn. La plej grava okazintaĵo estis la 64-a IFEF-kongreso. Tiu brila kongreso okazis en la „Esperanto-urbo Herzberg” en la pasintjara majo. Dum la kongreso okazis kelkaj neforgeseblaj eventoj, kiel post la inaŭguro la parada marŝo tra la malnova urboparto kun la urbestro kaj blovorkestro, la inaŭguro de la Esperanto-placo kaj Joachim Giessner-vojo fare de la urbestro, la altnivelaj kulturprogramoj, la vere altnivelaj prelegoj, la belegaj ekskursoj k.a. Dum la kongreso partoprenis 160 esperantistoj el 21 landoj. La komitato iomete longe traktis multajn tagordpunktojn, kaj decidis pri la kasraporto kaj la buĝeto, pri la elekto de la ĉefkomitatano kaj anstataŭanto, pri la venontaj kongresoj ktp. La Faka Komisiono plurfoje kunsidis, kaj rezultohave



La prezidanto de HFEA raportas

traktis la aktualajn terminojn. Fine mi mencias la grandan kaj bonrezultan laboron de la kunlaborantoj de la „Interkultura Centro Herzberg”, kiuj senlace helpis la laboron de la LKK.

La 96-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Vjetnamio. En la tuta kongresa semajno la partoprenantoj povis ĝui diversajn programojn kulturajn, sciencajn, ekskursajn, amuzajn kaj

fakajn. Flanke de IFEF partoprenis Ernst Quietensky aŭstra fervojista esperantisto, kiu entreprenis la taskon partopreni dum la komitatkunsidoj kaj aliaj fakaj kunsidoj, gvidi la fervojistan kontaktkunvenon.

En la pasinta jaro okazis du estrarkunsidoj de IFEF. La prinempan organizis la francaj fervojistaj esperantistoj kunligita kun la Franca Fervojista Esperanto-Kongreso en la urbo Angers. La aŭtunan estrarkunsidon ankaŭ la francoj organizis en Parizo. Ambaŭ kunsidoj bone sukcesis. La estraro traktis la kutimajn tagordpunktojn, inter ili la preparon de la sekvaj kongresoj, multajn movadajn temojn, la financajn situaciojn, la interrilatojn kun UEA kaj FISAIC, eĉ kun aliaj fakaj asocioj.

La tradicia Landa Amika Fervojista Esperanto-Renkontiĝo okazis en la sudhungarlanda urbo Szeged. Tiun renkontiĝon organizis la fakgrupo

Kiskunhalas-Kelebia. Partoprenis tiun 77 esperantistoj, inter ili 11 eksterlandanoj el Ĉeĥio, Germanio kaj Serbio. Dum la tritaga renkontiĝo la partoprenantoj vizitis kelkajn famajn muzeojn, preĝejojn, parkojn kaj interesajn konstruaĵojn. Interesa kaj emocia evento estis, kiam la vidvino de la mondfama esperantisto Tibor Székely faris projekciadan prezentadon pri la riĉa kaj varia vivo de sia edzo. Ankaŭ estis impona programo por viziti la naskiĝdomon de Julio Baghy, kie s-ino Zsuzsanna Vágóné-Bárány diris dignan rememoran paroladon. Okazis ankoraŭ vizito

de la Zoologia Ĝardeno, kaj promenado en la urbo. Estis interesa programero la oficiala laborkunsido, la komuna vespermanĝo kun balo. Mi gratulas al la organizantoj, kiuj preskaŭ profesie organizis la tutan renkontiĝon, kaj saĝe elektis la vidindaĵojn kaj la programon.

Se mi taksas la enlandan kaj internacian fervojistan Esperanto-movadon en la jaro 2012, mi devas diri, ke en la kadro de IFEF grave mankas la

gejunuloj, laŭaĝe maljuniĝas la IFEF-membraro, kontinue malkreskas la membro-nombro de nia federacio. Ankaŭ en Hungario iomete malaltiĝis la nombro de membroj de niaj fakgrupoj. Tamen se mi taksas la pasintjaran agadon, mi povas trovi multajn esperplenajn faktojn. Ni efektivigis la taskojn laŭ la laborplanoj de IFEF kaj de nia asocio, regule ni eldonis la revuojn „Internacia Fervojisto” kaj „Hungara Fervojista Mondo”, estis sukcesaj la planitaj kongresoj, konferencoj, kunsidoj kaj aliaj renkontiĝoj. Ni realigis la planojn sur la tereno de la instruado, ni akiris signifajn rezultojn rilate al la fakprelegoj kaj terminaraj laboroj ktp. Do la pasinta jaro donis al ni kelkajn malfavorajn rezultojn, sed ankaŭ kelkajn esperigajn faktojn.

Alvenis la jaro 2013, kaj mi denove esperas, ke tiu ĉi jaro kunportas bonajn kondiĉojn kaj rezultojn por la fervojista Esperanto-movado, eĉ por la ĉiutaga vivo. Kio okazos en 2013?

La plej grava evento estos la 65-a IFEF-kongreso, okazonta en la franca urbo Bordojo inter la 4-a kaj 11-a de majo. Dum la kongreso okazos estrarelekto, kiu grave determinos la pluan laboron de IFEF. Estas interesa afero, ke ĉi tiun kongreson ni komune organizos kun la landa asocio de la francaj esperantistoj, nome kun „Unuiĝo Franca por Esperanto” (UFE). La francaj fervojistaj esperantistoj jam kvinfoje organizis IFEF-kongresojn, eĉ multajn landajn fervojistajn kongresojn, estrarkunsidojn, staĝojn por lingvokursoj k.a., do ili havas spertojn por bone kaj altnivele organizi nian kongreson. Laŭ la kongresa programo ni havos multajn fakajn programojn, belegajn tuttagajn kaj duontagajn ekskursojn kaj altnivelajn kulturajn spektaklojn.

La 98-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Rejkjaviko, ĉefurbo de Islando. Pro la granda distanco, kaj la altaj kostoj verŝajne ne tro multaj esperantistoj partoprenos tiun (ĝis februaro aliĝis 611 esperantistoj el 50 landoj). Legante la kongresajn materialojn pri la movadaj kaj fakaj aranĝoj, la informojn pri la ekskursoj kaj kulturaj programoj, mi proponas partopreni en tiu kongreso.

En la mezo de marto okazos la printempa estrarkunsido de IFEF en la belega itala urbo San Benedetto. La estraro havas multajn, eĉ tro multajn



Partoprenantoj de la ĝenerala kunsido

gravajn temojn por trakti kaj helpi la laboron de la komitato de IFEF dum la sekva kongreso. Pri la aŭtuna estrarkunsido ni ankoraŭ ne decidis.

La 45-a Landa Amika Fervojista Esperanto-Renkontiĝo okazos en la urbo Vác. Laŭ la promeso kaj plano de la organizantoj ni havos riĉan programon dum la tritaga renkontiĝo. Okazos interesaj ekskursoj al la Botanika Ĝardeno de Vác-rátót, al la religia loko Máriabesnyő, al la urbo Gödöllő. En Máriabesnyő ni florkronados la tombojn de d-ro Kálmán Kalocsay kaj la iama ĉefministro, grafo Pál Teleki, en Gödöllő ni vizitos la „reĝan atendejon” de la reĝino Elizabeto en la stacidomo, kaj la Reĝinan Kastelon. Komunaj tag-

kaj vespermanĝoj, bankedo kaj balo, urborigardo en Vác, oficiala konferenco pri aktualaj temoj de la fervojista Esperanto-movado kolorigas kaj riĝigas la programon. Do mi proponas partopreni en tiu familiara renkontiĝo de la hungaraj fervojistaj esperantistoj.

La ĝenerala kunsido akceptis la laborplanon por la jaro 2013, kiu enhavas multajn taskojn, jene:

- Ni alĝustigas nian movadan laboron al la celoj de IFEF, UEA kaj HEA;
- Ni kunlaboras kun la landa asocio de FISAIC



Prezidanto kaj la sekretario dum la kunsido

(VOKE), kaj laŭ la kutima maniero ni kontinue informas ilin pri nia agado, eĉ post ĉiuj internaciaj aranĝoj ni donos detalan raporton al tiu;

- Ni kunlaboras kun la Hungaria Esperanto-Asocio (HEA), kaj ni subtenas tiun ĉi organizaĵon por iĝi vera reprezentanto de la hungaraj esperantistoj kaj enlande kaj internacie;
- Ni kunlaboras kun la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) pere de la estrara kaj komitatana postenoj, kaj per la aktiveco de la Redaktora Komisiono;
- Ni kunlaboras kun la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj kun aliaj Esperanto-organizaĵoj pere de niaj aktivuloj;
- Ni daŭrigas la kunlaboron kun la landaj sekcioj de la internaciaj fakaj organizaĵoj (ILEI, ISAE, UMEA k.a.) por helpi la fakan agadon en la kadro de IFEF kaj UEA;

- Ni plifortigas la rilatojn kaj kontaktojn kun la regionaj fervojaj reprezentantoj de Hungaraj Ŝtatformoj (MÁV);
- Ni disvastigas la interrilatojn kun la najbaraj eĉ aliaj landaj asocioj de IFEF pere de la invito al la Landa Amika Fervojista Esperanto-Renkontiĝo, kaj aliaj aranĝoj;
- Ni faras dum la jaro minimume dufoje estrarkunsidojn de nia asocio, kaj eldonas cirkulerojn pri gravaj eventoj kaj farendaĵoj;
- Ni plifortigas la rilatojn inter la estraro de nia asocio kaj la fakgrupoj, eĉ ankaŭ kun la membroasocioj, pro tio la estraranoj kaj la membroj de la Kontrola Komitato regule vizitas la kunvenojn de tiuj;
- Ni plenumas la taskojn por la Terminara Sekcio de la Faka Komisiono de IFEF;
- Ni aranĝas lingvokursojn por komencantoj kaj progresantoj ĉefe en la kadro de la klubvivoj;
- Ni eldonas kvaronjare – kaj papere kaj elektronike – nian fakan revuon „Hungara Fervojista Mondo” (HFM);
- Ni aktive agadas en la kadro de la Redaktora Komisiono de IFEF por prepari altnivelan internacian fakan revuon „Internacia Fervojisto” (IF);
- Ni instigas niajn membrojn por partopreni en Esperanto-kongresoj, konferencoj, renkontiĝoj kaj ĉefe en la klubkunvenoj;

- Ni konigas nian ideon kaj la Esperanto-movadon pere de ekspozicioj, murgazetoj, lokaj radio-kaj televidstacioj;
- Ni daŭre kompletigas kaj laŭeble eldonas la historion de la hungara fervojista Esperanto-movado;
- Ni donas helpon al la organizantoj de la ĉijara Landa Amika Fervojista Esperanto-Renkontiĝo;
- Fine ni efektivas ankaŭ tiujn taskojn, kiuj ni ankoraŭ decidis en la laborplano de nia asocio.

Tiuj taskoj donas al ni multajn laboron kaj farendaĵojn, kaj ni devas kontinue kaj senlace agadi por akiri akcepteblajn rezultojn. Al tiu agado mi deziras bonajn cirkonstancojn, sanon, kapablon, fidon kaj esperon.

István Gulyás
Prezidanto de HFEA

EL LA VIVO DE NIAJ FAKGRUPOJ

LA FAKGRUPO KISKUNHALAS-KELEBIA



La stacidomo en Kiskunhalas

Unu el la plej agema Fakgrupo de nia Asocio estas la Fakgrupo Kiskunhalas-Kelebia. Tiun fakton montras: la membro-nombro de la grupo (6 aktivaj, 15 pensiulaj, 54 protektantaj membroj, inter ili 9 IFEF-membroj), krome demonstras la regulaj

klubkunvenoj, la komunaj vojaĝoj kaj enlande kaj eksterlande, la instruada aktiveco pere de lingvoklubo, la partopreno en la IFEF-kongresoj, la interrilatoj kun eksterlandaj Esperanto-grupoj (Kronach el Germanio, Hennebont el Francio), la sukcesaj membrovarbadoj, la korespondadoj kun eksterlandaj esperantistoj ekzemple el Ĉinio, Anglio, Germanio, Francio k.a., la altnivele organizado de la pasintjara Landa Amika Fervojista Esperanto-Renkontiĝo en la urbo Szeged ktp. Atestas la bonan laboron de la Fakgrupo, ke ili povis konvinki multajn fervojistojn eĉ altrangulojn kaj aliajn homojn en Kelebia kaj Kiskunhalas eĉ en la sudhungarlanda regiono por subteni kaj patroni la Esperanto-movadon en tiu teritorio. Tiuj esperantistoj estas „protektantaj membroj” de la Fakgrupo, kiuj ne nur enpagas la membrotizon, sed donas eblecon por kopii la Esperanto-materialojn, donas ejon en la stacidomoj por kunveni, partoprenas en la agado de la Fakgrupo, kaj donas spacon en la stacidomoj por propagandi la Esperanton kaj la aktivecon de la Fakgrupo pere de murgazetoj. Pri tiuj murgazetoj István Sutka, la gvidanto de la Fakgrupo sendis la suban raporton:

KIEL PROPAGANDI ESPERANTON?

En la stacidomoj Kelebia kaj Kiskunhalas ekde dudek jaroj ni funkciigas afiŝtabulojn (alie murgazetojn) pri Esperanto por la pasaĝeraro. Tiu ĉi praktiko komenciĝis dum la 80-aj jaroj, kiam MÁV estigis Distriktajn Staciestrecojn. Tiutempe la stacio Kelebia apartenis al la Distrikta Staciestreco de Kiskunhalas, kies supera estro estis vera esperantisto, János Ónodi. Cetere li reorganizis kaj revivigis la Esperanto-movadon de Kiskunhalas.

En la jaro 2005 okazis traorganizado de MÁV, kaj tiam minaciĝis la plua funkciigo de la Esperanto-Murgazeto, ja la supera estraro de MÁV preskribis aŭ lu-prezon aŭ ĉesigon. Je nia petletero la MÁV-estraro permesis senpage funkciigi Esperanto-Murgazeton en la stacioj Kiskunhalas kaj Kelebia. Estis ĝojige por ni esperantistoj, sed post kvar jaroj, en 2009 la aŭtentikuloj refoje pretendis aŭ lu-prezon aŭ forigon de tiuj. Denove ni peticiis la senpagan funkciigon, kio rezultis favoran respondon.



Murgazeto en la stacidomo

Kion utilas tiuj ĉi murgazetoj? Per tio skribe – kun ilustritaj fotoj – ni informas la publikon pri tiuj enlandaj kaj eksterlandaj Esperanto-aranĝaĵoj, kiujn la esperantistoj de Kiskunhalas kaj Kelebia partoprenis, partoprenas.

Ni apudmetas flugfoliojn, ceterajn propagandilojn pri la estontaj aranĝoj, eventoj, pri la eblecoj de la lernado de Esperanto, pri la favoroj kaj eblecoj de la lingvo Esperanto. Krom tiuj eĉ ni aperigas dulingvajn (hungare kaj esperante) humuraĵojn.

Laŭ la spertoj niaj tio ĉi penadoj estas utilaj, ja ofte ni vidas pasaĝerojn studi tiujn sciigojn kaj bildojn, dum ili atendas la alvenon de la trajno. Ni publikas – nevene – nomon (kun adreso kaj telefonnumero) de memvolaj helpantoj, kunlaborantoj, kiuj donas pli larĝajn, pli detalajn informojn al interesiĝantoj. Riportero de „Halas TV” (regiona televid-studio) priatentis nian

murgazeton, eĉ la TV-studio jam dufoje invitis nin prepari riporton pri la loka Esperanto-movado, pri la avantaĝoj, lern-eblecoj de la lingvo Esperanto. En Kiskunhalas nia membro Zsuzsanna Vágóné-Bárány, instruistino de „Faka Mezlernejo Rákóczi” ĉiujare preparas lernantojn por fari ekzamenon pri la lingvo Esperanto.

Niaj ĝisnunaj spertoj atestas, ke la murgazetoj de ambaŭ stacioj bone, rezulte kontribuas al la popularigo de Esperanto-lingvo kaj -movado.

István Sutka

LA FAKGRUPO EN NYÍREGYHÁZA

Ankaŭ estas eminenta Fakgrupo de nia Asocio la „Verda Stelo” en Nyíregyháza. La membro-nombro ne estas tro granda, sed tamen kiuj apartenas al la Fakgrupo kontinue kaj entuziasme agadas por Esperanto. Ili havas entute 21 membrojn, el ili 9 estas aktivaj, 9 emerituloj, 2 lernantoj kaj 1 estas „protektanta membro”. Ĉiusemajne ili organizas klubkunvenojn, en kies kadro la membroj de la grupo ekzercas la lingvostudadon (tio estas la plej grava okupado

dum la klubkunvenoj), ili faras fakprelegojn, traktas la eventojn de la lasta semajno, eĉ ili organizas ankaŭ kulturajn programojn. Inter la membroj de la Fakgrupo agadas kelkaj internacie konataj esperantistoj, kiel la estrarano de ILEI kaj ankaŭ de HEA: Enikő Zengő Sereghyné, aŭ Miklós Zuberecz la gvidanto de la Fakgrupo „Verda Stelo”. Kelkaj okazoj ili invitas kaj akceptas eksterlandajn gastojn. Pri tiu evento sendis raporton la gvidanto de la Fakgrupo:

EKSTERLANDAJ GASTOJ EN NYÍREGYHÁZA

Nia esperantista klubo „Verda Stelo” de Nyíregyháza – funkcia en la loka Fervojista Kulturdomo – la 6-an de novembro 2012 akceptis eksterlandajn gastojn – utiligante la liveradon de la ’Pasporta servo’. Ili veturis el Belgio al urbo Jalta de Ukrainio, sed dumvoje ili laŭplane gastigadis ĉe sinjorino Enikő Zengő Sereghyné.

Ekde 1956 niaj klubkunvenoj okazas ĉiumarde – krom la du someraj monatoj.

Kiam ni eksciis pri la vizito de la du eksterlandaj gastoj, telefone ni informis kaj invitis niajn membrojn po akcepti ilin. Inter ni estis membroj, kiuj partoprenis la 1982-jaran aranĝaĵon J.E.R., okazinta en Nyíregyháza.

Post la alveno de niaj gastoj, tuj komenciĝis agrabla interkonatiĝo, interamikiĝo. El inter la gastoj la edzino estis rutena, la edzo belga, kiuj interkonatiĝis en Esperanto-kongreso. Cetere ili esperantlingve komunikas inter si.

Dum la klubkunveno demando sekvis

demandon, ĉiam pli vigliĝis la konversaciado. Rapide forflugis tiuj du horoj de ilia vizito, kio okazis en tre agrabla, vigla etoso. La ĉeestantoj regalis la gastojn per bakaĵoj kaj bonkvalita ruĝa vino memkultivita de samideano, nia klubano Aleksandro Bolyán.

Fine sonis la demando: kio plaĉis al ili pleje dum ilia vizito en Nyíregyháza? – Kun granda raviĝo ili respondis: „la Zoologia Ĝardeno! kaj elefanto!”. Laŭ ilia opinio „tiu ĉi zoologia ĝardeno estas la plej bela en Eŭropo!”.

Ho ve! – la vorto ’elefanto’ donis al ni ideon por kanti, kaj tuj ni komencis dikti la vicojn de la sekva kanto, kiun en 1962 ni lernis de sinjoro Simon Csóra en Budapeŝt:

*Estas best' la elefanto
tie sidas la lernanto...
Zimme, zum, la lernanto...
bum, bum, bum!
(refreno!)*

Poste ni kantis plu, eĉ aliajn kantojn. La kanto pri la elefanto treege plaĉis al niaj belgaj gastoj, eĉ je la fino de la kunveno kaj foriro la belgo jene adiaŭis: „Zimme, zum, ĝis revido!... bum, bum, bum.”

Post la klubkunveno ni ĉiuj iris al la Altlernejo de Nyíregyháza, kie sinjorino Enikő Zengő Sereghyné, estrarano de la Hungaria Esperanto-Asocio instruas la Internacian Lingvon Esperanto. La eksterlandaj gastoj certe longe konservos tiujn ĉi travivaĵojn kaj rememoros pri nia gastigado.

La gastoj petveturade alvenis el Belgio, poste ili veturis plu al la landlima urbo Záhony, kaj de tie per trajno ili daŭrigis la vojaĝon al la

duoninsulo Krimeo, kie vivas la gepatroj de la edzino.

Sen troigo ni povas imagi kaj supozi, ke niaj karaj gastoj, precipe la gajhumora, serena belga edzo en sia dormo – dum la klakado de la trajno – kantas la eklernitan refrenon: „Zimme, zum, Nyíregyház-anaj geamikoj, gesperantistoj, bum, bum, bum!”. Ni esperas, ke niaj gastoj, niaj eŭropaj „vagabondaj” geamikoj alvenis hejmen kun abundaj kaj agrablaj travivaĵoj.

Laŭ nia tradicio la 1-an de decembro 2012. nia grupo aranĝis Zamenhof-feston kun valora kulturprogramo, krome ni rememoris pri niaj iamaj gesamideanoj.

Miklós Zuberecz

FESTOTAGO DE ZAMENHOF EN NYÍREGYHÁZA

La 1-an de decembro okazis la tradicia festotago de Zamenhof en la urbo Nyíregyháza en la fervojista kulturdomo. La ĉeestantojn salutis Miklós Zuberecz, gvidanto de la loka fervojista Esperanto grupo „Verda Stelo”. En sia festparolo li rememoris pri vivo kaj laboro de Zamenhof. Poste li retrorigardis al plej gravaj eventoj de la kuranta jaro. En januaro vizitis la grupon gasto el Sud-Koreio, kiu pasis kvar tagojn en Nyíregyháza. La membroj de la grupo estis tre aktivaj kaj ili partoprenis diversajn en- kaj eksterlandajn aranĝaĵojn, kiel kongreso de kroataj esperantistoj, KAEST, Landa Amika Renkontiĝo en Szeged, Pedagogia Konferenco en Modra. En novembro la grupo akceptis esperantistan (ukraina-belga) geedzan paron. Ekzemplodona estas ke ili ĉiu marde aranĝas klub-kunvenojn, kie ili okupiĝas pri lingvo ekzercado. Fine Miklós Zuberecz rememoris pri iamaj jam mortintaj elstaraj membroj de la grupo, Antal Járó, Miklós Leveleki kaj Attila Sárosi.

Enikő Zengő Sereghyné salutis la ĉeestantojn je la nomo de la Hungaria Esperanto-Asocio. Ŝi informis pri la eventoj de la estrarelektita kunsido de HEA, kaj pri tio, ke ŝi estis elektita estrarano de ILEI. Ŝi parolis pri la labormetodo de ILEI. Grava tasko estos en la jaro 2013 organizi lingvan tendaron en Nyíregyháza. Jam nun ŝi petis la helpon de la loka

Esperanto-grupo.

Győző Gál deklamis la poemon de Zamenhof, titolitan „La vojo”

D-ro József Halász salutis la ĉeestantojn je la



Partoprenantoj dum la Zamenhof-festo

nomo de Hungara Fervojista Esperanto Asocio. Li menciis, ke antaŭ kelkaj semajnoj okazis estrarkunsido de nia Asocio, kie ni taksis la situacion de la enlanda kaj internacia fervojista Esperanto-movado. Ni konstatis ke la grupo „Verda Stelo” apartenas al la plej aktivaj landaj organizaĵoj. Tiu sistema lingvoekzercado kiun la grupo faras estas modelvalora. La estraro de nia Asocio diras dankon al la grupo pro la aktiva agado, kaj deziras rezultohavan laboron multe da sukceso por la sekva jaro.

La saluton de la fervojistaj esperantistoj el urbo Debrecen transdonis Pál Hepp.

Poste la kunveno daŭris en amika etoso.

D-ro József Halász

„KIE NIAJ TOMBOJ ESTAS” OMAĜO AL...

Jam tradiciigis, ke de jaro al jaro ni primemoras niajn pionirojn okaze de ilia (relative) rondcifera datreveno. Generale ni partoprenas ilian enterigan ceremonion kaj promesas konservi iliajn meritojn kaj memoron. Ĉe la enterigaj ceremonioj ofte ni promesas: „Ni konservas Lian/Sian memoron”.

“Kie niaj tomboj estos,
nepoj genuflekse festos,
bene en la preĝon dankan
plektos nian nomon sanktan”
(*Petőfi-Kalocsay*)

Lajos ÁKOS (Kiglits; 1890-1978) antaŭ 35 jaroj mortis. Li estis ĉefinspektoro de MÁV, fervora aktivulo de Esperanto, kolektanto de E-libroj kaj revuoj, kiujn disponigis vaste por la interesiĝantoj. Antaŭ lia morto li donacis sian bibliotekon al la biblioteko de la hungara fervojista Esperanto-organizaĵo.

Ádámné Mária BALOGH (1943-2010) antaŭ 70 jaroj naskiĝis. Ŝi estis membro kaj fervora aktivanto de nia asocio MVEE; partoprenis multajn IFEF- kaj UEA-kongresojn. Dum multaj jaroj ŝi faris la librotendon kaj de HFEA kaj de HEA; eĉ ŝi estis la kasisto de LKK dum la 52-a (Budapest) kaj 56-a (Sopron) IFK-j. Ŝi estis multflanka, altkvalita, diligenta, preciza, inteligenta kaj entuziasma esperantisto.

D-ro István BÁCSKAI (1908-1996) antaŭ 105 jaroj naskiĝis. Li estis fondinto de la Fervojista Fakgrupo de HEA, fondinto de la faka revuo Hungara Fervojista Mondo. Lia E-movada aktivado estis tre multflanka kaj enlande kaj internacie. Kontinue li verkis altvalorajn artikolojn, prelegis en diversaj E-aranĝaĵoj. Li estis komitatano „A” de UEA por HEA, same tiu por IFEF. Li organizis kaj gvidis la hungaran fervojfakan Terminaran Komisionon, eldonis fervojfakan poŝvortaron; iniciatis kaj realigis aperigi la klarigan teskton de la fervoja horarlibro en Esperanto. Li estis la ĉefa organizanto de la 14-a IFEF-Kongreso

(en Budapest, 1962), aktiva kunlaboranto de la 34-a IFK (Balatonfüred, 1982), de la 47-a IFK (Pécs, 1995), kaj same tiu de la 68-a UK (Budapest, 1983). Li kreis multe, kvazaŭ ne estas denombreblaj liaj agadoj, laborterenoj, rezultoj. Li havis multajn altajn distingojn: ora medalo de FISAIC (1982), Honora Membro de IFEF (1988), Honora Membro de UEA (1996).

Imre BOJTOR (1923-1999) antaŭ 90 jaroj naskiĝis. Li estis speciala fakulo ĉe la Komerca Servo de Budapeŝta Fervojdirekcio. Li alproprigis la Internacian Lingvon Esperanto kaj membriĝis al la Fervojista Fakgrupo de Budapest. Li estis kvalifikita kantisto pri popolkantoj kaj operetoj. Plurfoje li rolis en gravaj Esperanto aranĝoj kune kun la kantartistino Katalin Madarász.

Simon CSÓRA (1904-1968) antaŭ 45 jaroj mortis. Li estis esperantisto ekde 1922, ekde tiam li laboris diligente en la movado. Li gvidis lingvokursojn, eĉ ankaŭ en eksterlando kiel lerta aplikanto de la Ĉeh-metodo; redaktis la fakan revuon HFM (1957-1967). Li estis elstara kunlaboranto de la 14-a IFK en Budapest, same tiu de la 51-a UEA-kongreso en Budapest. Ĝismorte li estis komitatano de HEA kaj diligenta aktivulo de la Fervojista Fakgrupo de HEA.

Joachim GIESSNER (1913-2003) antaŭ 100 jaroj naskiĝis kaj antaŭ 10 jaroj mortis. Ekde sia juna vivo diligente, konscie kaj fervore li aktivadis por Esperanto. Li fondis E-grupojn, redaktis periodaĵojn, senlace instruis, agitis, organizis; prelegis dise en la mondo de Esperantujo, kolektis kaj flegis la materialon de la historio de IFEF, evoluigis la E-movadon; arte tradukis poemojn, kantojn,; riĉigis la specialan fervojistan literaturon kaj kulturon, multe li faris por la evoluigo de FISAIC-organizo. Inter la jaroj 1968-1990 li estis la prezidanto de IFEF. Li ricevis multajn ŝtatajn kaj Esperanto-distingojn, inter ili „Honora prezidanto de IFEF” kaj „Honora membro de UEA”.

Henning HAUGE (1935-2003) antaŭ 10 jaroj mortis. Ekde lia 25-jara aĝo li estis ĝismorte tre aktiva esperantisto de la Dana Esperantista Fervoĵista Asocio, same tiu de FISAIC kaj IFEF. Dum 28 jaroj mastrumis la ekonomiajn aferojn de IFEF. Li estis unu el la plej kapablaj, sindonaj kaj agemaj ĉefrolantoj.

Mátyás HOLLÓ (1896-1978) antaŭ 35 jaroj mortis. Dum pli ol 50 jaroj li estis fidela esperantisto., membro de la fervoĵista Esperanto-Fakgrupo en Dunakeszi. Entuziasme li interesiĝis pri la fervoĵista internacia movado.

János INGUSZ (*?-1998) antaŭ 15 jaroj mortis. Li estis entuziasma esperantisto; profesie talenta pedagogo, direktoro de elementa faklernejo (pri matematiko, sporto kaj Esperanto) en Budapeŝt. Unesco organizis kaj aranĝis eksperimenton pri la instruado de Esperanto en la elementaj lernejoj. J. Ingusz aliĝis al tiu eksperimento kaj atingis gravajn rezultojn. La grupoj de la lernantoj de tiu E-fako ĉiujare partoprenis en internaciaj E-tendoj, same en E-lingvaj konkursoj, kaj akiris internaciajn rekonojn.

Lajos KAPITÁNY (1911-1988) antaŭ 25 jaroj mortis. Li estis esperantisto ekde 1932. Li plenumis gravajn funkciojn en la movada vivo: ĉefsekretario de HEA, gvidanto de la Fervoĵista Fakgrupo en Dunakeszi. Li partoprenis plurajn IFEF- kaj UEA-kongresojn. Li organizis la novan E-lingvan eldonon de la drama poemo de Imre Madách: 'La tragedio de l' homo'. Ekde 1965 kontinue li laboris en la hungara sekcio de la Terminara Komisiono de IFEF. Okaze de la 51-a UK (Budapeŝt) kun eminentaj esperantistoj li tradukis la gvidlibron 'Vojaĝlibro de Hungario', krome kiel radioamatoro li kompilis broŝuron sub titolo 'Etero-Gvidlibro'. Li verkis multajn artikolojn por E-revuoj. Li partoprenis plurajn IFEF- kaj UEA-kongresojn, organizis 'Landa Amika Renkontiĝo'-n en Dunakeszi (1980).

Pál KRISTEK (1920-1993) antaŭ 20 jaroj mortis. Li naskiĝis en 1920; kaj post abiturienta ekzameno li estis dungita ĉe MÁV. Li havis gravajn laborterenojn en la Fervoĵdirekcio de Budapeŝt, poste ĉe la

Generaldirekcio de MÁV. Li esperantiĝis en 1959 kaj baldaŭ li fariĝis diligenta aktivulo de la E-movado. Post la akiro instrukapabla ekzameno kaj diplomo, seninterrompe li gvidis lingvokursojn, eĉ ĉe la Oficir-prepara kaj Pliperfektiga Instituto de MÁV kiel fakultativa studobjekto. Li estis sekretario de Fakgrupo, komitatano de HEA; ofte li organizis en- kaj eksterlandajn eventojn; partoprenis multajn IFEF- kaj UEA-kongresojn. Post la morto de Simon Csóra li prenis la redaktan laboron de la faka revuo HFM. Li estis modesta, ĉiam helpopreta, diligenta kolego kaj samideano.

Gyula MADARÁSZ (*?-1988) antaŭ 25 jaroj mortis. Li estis fervoja ĉefinspektoro de MÁV en Debrecen. En 1961 li esperantiĝis, en 1967 li fariĝis IFEF-membro. Dum 11 jaroj li estis la sekretario de la Fervoĵista Fakgrupo en Debrecen. Li faris bazan kaj mezgradan lingvo-ekzamenojn pri Esperanto, poste li gvidis lingvokursojn. Ofte li prelegis altnivele en la klub-kunvenoj. Lia modesta kaj dignoplena personeco montris sekvindajn ekzemplojn al la esperantistaro.

László MARSOVSZKY (*?-1983) antaŭ 30 jaroj mortis. Li studis muzikon kaj akiris diplomon pri la ludadoj de violono, trumpeto kaj komponado. Li komponis eĉ je la honoro de Esperanto. Li esperantiĝis en 1962, kaj partoprenis plurajn IFEF- kaj Universalajn E-kongresojn.

József ÓHALMI (1900-1963) antaŭ 50 jaroj mortis. Li alproprigis la lingvon Esperanto en 1920, kaj de post li aktivadis en la movada laboro. Li apogis la Esperantan literaturon per aĉetado de gravaj libroj. Li entuziasme kolektis Esperanto-glumarkojn. Li kontribuis al la organizado kaj aranĝo de la 14-a IFEF-kongreso en Budapeŝt (1962).

Tibor PAPP (1947-2003) antaŭ 10 jaroj mortis. Li estis „pursanga” esperantisto ekde sia juna aĝo. Se li aperis ie, li jam kunportis novajn ideojn, planojn kiel pli efike prosperigi Esperanton. Liaj ideoj jam estis en praktiko elprovitaj, ja li estis praktika homo, ne nur kritikema. Li fondis modestan literaturan gazeton, titolita 'Debrecena Bulteno'. Lia fidela, persista laboro vivigis kaj plenigis la gazeton per iu tute speciala materialo, kiu faris

ĝin unika en Esperanto.

Zsigmond SIMONYI (1853-1919) antaŭ 160 jaroj naskiĝis. Li estis universala profesoro pri lingvistiko de la 'Hungara Lingvosciencia Societo', redaktoro de la periodaĵoj 'Hungara Lingvogardo' kaj 'Lingvistikaj Kajeroj'. Dum kvar jaretoj li kvalifikis lingvistikojn. Li estis vicprezidanto de la 'Propaganda Komitato por Lingvo Internacia', klopodis enkonduki Esperanton en la Universitaton.

Stevan V. STOJNIĆ (1887-1963) antaŭ 50 jaroj mortis. Li estis fervoja ĉefkonsilanto, ekde 1911 esperantisto. Li estis la unu el la plej gravaj pioniroj de la fervojista Esperantomovado inter la du mondmilitoj. Li estis prezidanto de la tiam Internacia Asocio de Esperantistaj Fervojistoj (IAEF) kaj redaktoro de ĝia bulteno 'La Fervojisto'. Li verkis bonegan E-lernolibron, organizis kaj gvidis lingvokursojn kaj senlace propagandis la Internacian Lingvon.

Dezső SZILÁGYI (1908-1982) antaŭ 105 jaroj naskiĝis. En sia junaĝo li estis lokomotivestro, poste li plenumis ĉiam pli gravajn taskojn en la fervojista mondo de Debrecen. Li diligente agadis en la sporta, fervoj-sindikata, kaj esperantista movadoj. Pro siaj laboremo kaj kapabloj li fariĝis organiza sekretario de la Fervojista Fakgrupo en Debrecen. Vigle kaj entuziasme li agadis, penadis por la movado kaj partoprenis multajn IFEF-Kongresojn.

Lajos TAKÁCS (1898-1963) antaŭ 50 jaroj mortis. Li estis la plej malnova hungara membro de IFEF; ĉiam li aktive partoprenis en la E-movada laboro en Debrecen. Li gvidis multajn lingvokursojn. Li partoprenis en la aranĝo de la 14-a IFEF-kongreso en Budapeŝto (1962). Li ofte vojaĝis al eksterlandoj kaj utiligis, propagandis la Internacian Lingvon.

Péter TÖRÖK (1857-1929), profesoro (de mineralogo-botaniko-entomologo) antaŭ 155 jaroj naskiĝis. Li esperantiĝis en 1907, li estis gvidanto de la Esperanto-movado en Debrecen. Li verkis E-lernolibron (1909); lia verko (1912) sub titolo „Normala Sintakso de

Esperanto” estis internacie premiita; li verkis 288 paĝan 'Plena Esperanta-Hungara vortaro'-n, kiu prezentis ne nur la vortradikojn, sed ankaŭ kunmetaĵojn, derivaĵojn; li preparis porĉiaman kalendaron.

Tibor ÚJLAKI NAGY (1915-1997) antaŭ 15 jaroj mortis. Li prilaboris la fundamenton de la sporta lingvo en Esperanto. Surbaze de la trastudado de la koncernaj konkurs-regularoj li verkis studon (ampleksantan ĉ. 300 tajpitajn paĝojn) pri 30 plej gravaj sportbranĉoj de la internacia sporta vivo. Ĝi ne estas seka vortaro, aŭ kolekto de fakaj difinoj, sed sur po 5-10 paĝoj ĝi konigas la sportbranĉojn kaj donas la modelon de la flua, facile komprenebla, tamen faka kaj por oficialigo taŭga sporta lingvo. Ĝi aperis en 1972 sub titolo „La Sporta Lingvo en Esperanto”.

Pál VÁRADI (1896-1958) antaŭ 55 jaroj mortis. Li estis fervoja ĉefinspektoro; en 1916 li esperantiĝis. Altnivele li regis la Internacian Lingvon, tamen pro lia troa modesteco li ne entreprenis gvidi kurson, li ne akceptis gvidrolon en la movado, sed per speciala entuziasmo li dediĉis sin al la hungara kaj esperanta lingvistikoj. Li estis helpema, atentema al ĉiu lia kunhomo; aktiva pacbatalanto. Li partoprenis en la ekspedado de la gazeto 'Paco'. Li havis propran Esperanto-bibliotekon, kiun post lia morto oni transdonis al la urba Biblioteko de Szeged.

Ŝtapel VALIG (1896-1963) antaŭ 50 jaroj mortis. Li estis firme konvinkiĝinta pri la valoro de la lingvo Esperanto. Post la fino de la dua mondmilito – malgraŭ la tiamaj malfacilaj cirkonstancoj – li fondis la Fervojistan Esperantistan Rondon Nederlandan (FERN) kaj ankaŭ IFEF, kies prezidanto li estis dek jarojn. Liaj kongresaj paroladoj entuziasmigis multajn kongresanojn je pli aktiva kaj pli persista movada laboro. Dum la 9-a IFEF-kongreso li donis malavare bonajn kaj valorajn konsilojn kaj inspirojn, kiam oni komencis organizi la hungaran IFEF-sekcion. Li ĉiam estis fidela, sincera kaj helpema amiko al ĉiuj.

János Patay

Neceseco de Hegel en Szigethalom: apogo de Esperanto

Tezo de la filozofio de Hegel estas, ke el la reciproka efiko de hazardoj estiĝas neceseco unu al la alia. Ties vivanta pruvo estas, ke en la urbo Szigethalom la kultura asocio – kun gvidado de *Ilona N. Pető 'Szigethy'* – estiĝis daŭra propagando kaj subtenado de Esperanto, eĉ ĝiaj literaturo kaj subvencio. En Szigethalom jam ankaŭ la elformiĝo de la kultura centro estis hazarde naskiĝinta neceseco. Ilona Németh Pető – laŭ sia posta artista speŭdonomo „Ilona N. Pető 'Szigethy'” – kun sia edzo *József István Németh* ŝatis la kulturon, kaj altiriĝis al la patrujkono. Dum sia tralanda migrado ili koniĝis ne nur lokajn kulturajn valorojn, sed ankaŭ multajn samajn pensmanierulojn, kulturŝatantojn kaj -agantojn, kun kiuj ili interamikiĝis.



Ilona N. Pető Szigethy kun János Patay

Dum la vizito en la urbo Hencida Ilona trovis la ideon, ke ankaŭ en Szigethalom oni povus estiĝi similan kulturen centron. Ties kondiĉoj estis je dispono: en sia familio krom ŝi estas kulturen agadon aktivantoj, nome verkantoj memuaron kaj poemojn, deklamantoj, goblenon farantoj, kaj pentroartistaj familianoj vivantaj en Kubo. Al tiu ĉi familia kerno aliĝis geamikoj akiritaj dum la patrujmigrado, konatuloj, profesiaj kaj amatoraj

verkistoj, poetoj, artistoj, krome interesiĝantoj pri la artaj produktaĵoj. Tielmaniere la familia rondo larĝiĝis je granda amika familio, kion karakterizas amo, estimo kaj krea helpo unu inter la alia. Intertempe ĉi tiuj kulturaj interrilatoj disvastiĝis ankaŭ trans la landlimon. Ilona – kiel ĉefredaktoro – en kulturaj magazinoj (sub titoloj *Hajnali Fény* [Aŭrora Lumo en j. 1997], pli poste *Szigethalom* [de j. 1998]), publikis tiujn verkojn, fotojn, informojn pri aranĝitaj ekspozicioj, krome en pojaraj antologioj; kaj distingis la plej prosperajn kreantojn per diplomo, memorplasto, premio *Helena 'Szigethy* (statueto). Ŝia vicredaktoro estis sia edzo, kaj post lia morto unue la esperantisto *László D. Nagy* el urbo Pécs, poeto kaj kant-aŭtoro estis. Kiel literatura lektoro, dum ses jaroj la eminenta profesoro kaj ekzamenisto de Esperanto, *D-ro Ferenc Jáki* multflanka scienculo – poeto, art-tradukisto, lignoskulptisto, fotisto – helpis la vivon de tiu ĉi kultura centro.

Jam la influo de tiuj ĉi du esperantistoj faris simpatia la lingvon Esperanto por Ilona. Ĉi tiun influon plue firmigis iu pli nova neatendita evento. Okazis, ke ĉe la libroeldonejo Alterra en 1997 en la sama Antologio (titolita *Kristnaska donaco – Karácsonyi ajándék*) aperis la poemoj de D-ro Ferenc Jáki kaj la poemoj de *Imre Domokos*, lia iama instruisto dum la supera Esperanto kurso, eĉ pli poste liaj disĉiplo kaj amiko. Sinjoro profesoro Jáki organizis sian disĉiplon al la agado de la kultura klubo de Ilona N. Pető, per tio firmiĝis la tiea influo de Esperanto. Je alvoko Imre Domokos tradukis du verkojn de József István Németh al lingvo Esperanto, kiuj temas pri vivofilozofio, pri la amoj de laboro kaj familio, emfazante, ke eĉ mort-malsane oni indas lukti por la vivo, por la racio de la vivo, por realigo de la noblaj celoj. Tielmaniere je la kosto de Ilona N. Pető ĉi tiuj libroj aperis spegultraduke ankaŭ en dulingva

eldonaĵo, titolitaj: „*En ombro de la vejnarmalvastiĝo kaj de la tumor*” (*Az érszűkület és a tumor árnyékában 1999*); „*Kiel kaptito de la vejnarmalvastiĝo kaj de la tumor*” (*Az érszűkület és a tumor foglyaként 2000*).

Ankaŭ László D. Nagy disvastigis similan pensmanieron en sia hungarlingva libro, titolita „*Miraklofonto*” (Csodaforrás) en kadro de moderna fabelo de Aesopus, prezentante iun manieron de la resanigado, kaj tiun de la ekonomia prospero. Imre Domokos ankaŭ ĉi tiun libron esperantigis en 2000. László D. Nagy kovris la preskotizon de la spegultraduka „*Miraklofonto*”, sed Ilona helpis disvendi ĉi tiun libron. Baldaŭ pliaj du esperantistoj aliĝis al la kultura vivo de Szigethalom, nome : *Anita Hitka Dévi* kaj *József Dudás*.

De tiuj kvin esperantistoj ne nur hungarlingve, sed ankaŭ en Esperanto multfoje aperigis poemojn, precipe art-tradukaĵojn en Esperanto, sed ankaŭ originale Esperanto-verkojn. Pri la efektivigitaj rolo kaj signifo de Esperanto – en la kultura vivo de Szigethalom – Ilona N. Pető ’Szigethy informas per sia verko, sub titolo: („*N. Pető ’Szigethy Ilona munkássága I.*”), „*Pri kreado de Helena ’Szigethy N. Pető*” – same proprakoste eldonita. Ŝi prezentis tiun ĉi sian libron en la amika „*Stancsics Klubo*” je la 09.02.2011. Ilona forgesas nek pri la fratkluboj, nek pri la mortintaj klubanoj. En siaj kulturaj revuoj daŭre ŝi konigas la vivon, eldonaĵojn de la fratkluboj, kaj flegas la memoron de la mortintaj klubanoj per fotoj, iliaj cititaj poemoj, aŭ per nekrologoj. Ĉi tiun tradicion daŭrigante, la 11-an de decembro 2012 en la Filio-biblioteko n-ro 12 de la „*Ĉefurba Ervin Szabó Biblioteko*” ŝi aranĝis specialan memorprogramon pri niaj ankaŭ nelonge mortintaj kvar eminentaj klubanoj.

El inter la kvar personoj *D-ro Ferenc Jáki* estis en la centro de la primemoroj. Honore al ili Ilona preparis kaj dividis al la ĉeestantoj du specialajn „*Memoreldonaĵoj*”-n, la I-an volumon pri D-ro Ferenc Jáki, kaj la duan volumon pri Ferenc Okányi Kiss, István Iván Bor, György

Mecsekajjai Szemesi, niaj klubanoj. Ambaŭ volumoj estis riĉenhavaj kaj dignoplenaj al la primemoroj. Krom la dividitaj kajeroj Ilona kunportis kaj prezentis kelkajn produktaĵojn, objektojn – pentraĵojn, grafikaĵojn, statueton, lignoskulptaĵon – valorajn kolektaĵojn el la propra Muzeo. Inter ili ankaŭ unikaĵo troveblas, kiel ekzemple la iama ardezo-tabulo de D-ro Ferenc Jáki, uzanta dum sia generallerneja studado.

Al la memorprogramo iamaj estraranoj de HFEA, kongresaj kunlaborantaj esperantistoj kaj disĉiploj partoprenis en tiu ĉi kunveno, eĉ el la malproksima parto de la lando. La bibliotekestro Sino Margit Hravecz Porhajjas inaŭguris solenaĵon. Post varmaj salutvortoj ŝi konigis la estiĝon kaj funkciadon de la filio-biblioteko. Ŝi emfazis, ke ne unuafoje ŝi disponigas lokon al la kunveno de la kultura klubo de Szigethalom, ĝoje ŝi konstatis, ke ĉikaze kun multaj esperantistoj vastiĝis la rondo de la partoprenantoj. Poste Ilona N. Pető ’Szigethy komencis la primemoron, konigante la biografion kaj multflankan agadon de D-ro Ferenc Jáki. Ŝi menciis liajn esperantajn kaj ŝtatajn distingitajn laŭdojn, parte surbaze de la „*Memoreldonaĵo*”, aliparte surbaze de la komuna literatura kreado.

La ekspoziciitaj objektoj ilustris la multflankan sciencan agadon de D-ro Jáki, kion la titolpaĝo de la „*Memoreldonaĵo*” koncize vicigas. La porokaza eldonaĵo detale dokumentas, ke D-ro Ferenc Jáki kiom gravecon atribuis al la propagando de la kulturo krom sia multflanka scienca agado. Ĝenerale kun atenton vekanta profesora metodo verkis konigojn el la grekaj kaj romianaj mitologioj, pri la olimpiaj kutimoj, pri la skribmodo de la kronostikono, pri elformiĝo kaj signifo de kelkaj vortoj – ekzemple pri karnevalo – alie hungarlingve ’farsang’. Li multfoje rolis ĉe ekspozicioj, – ekzemple en Balatonfüred dum la 34-a IFEF-kongreso – en literaturaj programoj; en ekskursaj memorlokoj, eĉ prezentante ankaŭ gregorian kanton. Okaze de la entombiga ceremonio oni diris: rilate la Esperanton, li ne nur per kursoj, sed ankaŭ en la radio instruis la internacian lingvon ĝis tiam, kiam oni ĉesigis ĉi tion programon; eĉ eksterlande li gvidis

lingvokurson laŭ Ĉeh-metodo.

Ni partoprenantoj unue kantis el la esperantigitaj popolkantoj de D-ro Ferenc Jáki, poste alĝustigante al la procezo de la biografio ni legis el liaj poemoj, kiuj temas je la naskoloko Érd, je la patrujo, naturo, kulturo, je amo por Dio kaj homaro, pri sia mirinda saviĝo el la kaptitkolektado dum la dua mondmilito, krome pri tiu lia humora travivaĵo, kio okazis sur la placo de Herooj kun siaj gelernantoj. Rilate sian familian vivon, sonis po iu poemo de lia edzino Margit Lengyel instruistino, kaj de lia vivkunulino – post la morto de sia edzino, nome D-rino Marianna Legányi kuracisto, poeto. D-ro Jáki kaj D-ro Legányi estis parencanimoj, ĉar ambaŭ ricevis la altrangan distingon „Kavaliro de Hungara Kulturo”. La „Memoreldonaĵo” enhavas la poemojn, verkitaj al la du amataj virinoj. Ni, partoprenantaj esperantistoj kompletigis la primemoron per niaj propraj travivaĵoj. Tielmaniere ni ĉiuj sentis tiel, kvazaŭ s-ro profesoro Jáki ne nur anime, sed ankaŭ efektive ĉeestintus inter ni. Simile ni rememoris pri niaj aliaj tri klubanoj per konciza resumo de iliaj agadoj:

Ferenc Okányi Kiss estis – kun supergradaj ŝtataj premioj distingita – poeto, publicisto, kritikisto, kulturpropagandisto, kiu en Pestszentlőrinc fondis la kulturan fratoklubon TAMA („Tűzedzők Alkotó Művészbárát Asztaltársaság” – Artista Tablosocieto de Emajlistoj), kaj samtempe – inter aliaj – ankaŭ en la kultura centro de Szigethalom laŭorde agadis. Kiel kritikisto, li ne estis oportunisto: kritikis, sed dume per helpa volo, delikate okupiĝis pri evoluigo de la talentuloj. Kiel kulturpropagandisto li fervorigis la redaktorojn je tasko: „oni redaktu pli allogajn, atenton-senton vekigantajn antologiojn!” Per selektado oni postulu kvaliton, samtempe flegu la talentulon. Eĉ nuntempe estas sekvendaj la instruado kaj la ekzemplodono de Ferenc Okányi Kiss.

György Mecsekajai Szemesi kiel poeto, grafikisto, pentristo, skulptisto, fotisto partoprenis en la agado de la kultura centro de Szigethalom.

Kiel skulptisto, li preparis memorplaketojn kaj la negativaĵon de la statueto Ilona N. Pető 'Szigethy, destinita je honorigo de eminentaj klubanoj.

István Iván Bor estis grafikisto, pentristo, ditingita per diplomo kaj arta premio, kiu en Pestszentlőrinc estris la TAMA fratoklubon, kaj aktive partoprenis en la vivo de la kultura centro de Szigethalom.

Ĉe la fino de mia raporto mi denove reiras al *D-ro Ferenc Jáki*. Kiam li konatigis la sep miraklojn de la mondo, koncerne la piramidojn li klarigis, ke tial oni konstruis tiujn, ke oni prezentu la postmortan senmortecon. Surbaze de sia vivofilozofio li anoncis, ke ĉi tio ne estas privilegio de la faraonoj: la monda agado de ĉiu homo dependas de tio, dum sia vivo oni ĉu povas krei nepereigeblaĵon similan al piramido. Ekzistas, kiu sukcesas krei plenan piramidon; kaj ekzistas, kies piramido mankhava restas pro la mallongeco de la tempodaŭro de la sorto. Tamen estas la plej grave, ke eĉ tielmaniere oni kreu nepereigeblaĵon. Dependas de la tera agado ĉe ĉiuj homoj, ke ili ĉu povas krei al piramido similan longdaŭraĵon en siaj vivoj. Ekzistas oni, kiu sukcesas perfektan piramidon krei, kaj ekzistas ankaŭ tiu, ĉe kiu sia piramido mankhava restas por la fiksita tempomallongeco el volo de la sorto. Sed la esenco estas tio, ke ni eĉ tielmaniere restindaĵon kreu. Ĉi tion anoncas D-ro Jáki en sia Piramido titola poemo hungara tielmaniere:

Piramido

Tiel, aliel, sed ĉiuj

al si piramidon kreas,

ĉar per sia kreaĵo al morto kontraŭdiras.

Niaj kvar mortintaj artistaj kunuloj kreis ĉi tian piramidon, tial ni kunvenis esprimi honoron al ili. *Ilona N. Pető 'Szigethy* nuntempe ankoraŭ altigas sian propran piramidon. Iun flankon de sia piramido ŝi komencis konstrui en 1997 per la propagando, literatura kaj financa subteno de Esperanto. Tial ni kvalifikas Ilona merite „Honora Esperantisto”.

Imre Domokos

PIETATE NI PRIMEMORAS

La filio de 'Szabó Ervin Biblioteko de la Ĉefurbo' ekspedis specialan leteron, per kio ĝi kompleze invitis la legantojn de la biblioteko kaj esperantistojn je literatura programo, dediĉata je la memoro de D-ro Ferenc Jáki.



János Patay en la biblioteko

La invititoj akurate kolektiĝis en la biblioteko, eĉ ne nur la regule vizitantoj de la biblioteko, sed ankaŭ tiuj esperantistoj, kiuj ne havas rilatojn kun tiu ĉi biblioteko. La aranĝaĵo havis tiom grandan interesiĝon, ke preskaŭ ne estis sufiĉa la rezervita loko. Ĉiu alveninto ricevis porokazan proksimume 50-paĝan memorkajeron (en mezuro A/4, – kun eleganta kovrilpaĝo), kio ligis la kopiojn de literaturaj revuoj pri Jáki (poemojn, artikolojn de/pri Li) je bukedo.

La estrino de la biblioteko kun varmaj vortoj bonvenigis la ĉeestantojn.

S-ino Ilona N. Pető 'Szigethy – fondinta membro kaj estrino de la «'Szigethy Irodalmi és Művész Kör» ('Szigethy Literatura kaj Arta-Rondo), responda redaktoro kaj

eldonanto de tri literaturaj revuoj, kaj tiu de sep antologioj; krome fondinto kaj funkciiganto de «Németh József István Emlékház» (Memordomo) en loko Szigethalom – direktis la tre riĉan programon.

Enkonduke ŝi koncize prezentis la vivon, vastan instruon-edukan karieron, multflankajn literaturan, artan kaj Esperanto-movadan agadon, rezultojn de d-ro Ferenc Jáki, alie nia 'Oĉjo Feri'. Dum sia parolo tre eltroveme ŝi kolorigis la primemoron per deklamo de laŭ teme aktualaj poemoj de Ferenc Jáki, fare de gesinjoroj Ilona N. Pető, Hitka Anita Dévi, Piroska Horváth kaj Imre Domokos.

Oni laŭtlegis gajan artikolon pri sia eksterlanda aventuro de Ferenc Jáki, kio aperis en la revuo Hungara Fervojistaj Mondo. El inter estintaj instruatoj la verkanto Gyula Gondos de urbo Kisvárda laŭtlegis kelkajn prozojn de Jáki; krome István Somogyi, kantisto de Rákoskeresztúr prezentis popolkantojn.

Imre Domokos kompletigis la festparolon kun pliaj signifaj donitaĵoj. Ferenc Jáki strange evitis la militkaptitecon. Kiam la rusoj varbis virojn por „malinki robot” je iom da laboro, juna rusa soldato alparolis lin, ĉar li vestiĝis je sutano, kaj demandis lin: „Ĉu vi estas pastro?” – Sincere li respondis: „Jes”. La rusa soldato elvenigis lin el la amasigita vir-grupo kaj diris al li: „IRU HEJMEN! KAJ PRĜGU!” – El la alparolo de Imre Domokos kelkaj eksciis, ke Jáki dum sia aventura kariero estis traktlaboristo de MÁV, sed kiam malkaŝiĝis, ke li finis ne nur kvar klasojn de mezlernejo, sed li havas eĉ pastran kaj profesoran diplomojn, oni tuj maldungis lin de la fervojo pro lia „troa instruiteco”. Lia fervojista kariero evidentigas,



Rememoro pri Ferenc Jáki

kial li membriĝis al la Fervoĵista Esperanto-Fakgrupo, kiam oni ĉesigis la Pedagogan Esperanto-Fakgrupon de Budapeŝt. Li plurajn jarojn aktive kunlaboris kun la redakcio de Hungara Fervoĵista Mondo kiel lingva revizoro kaj korektisto. Li akcelis la fervoĵistan movadon per organizado kaj gvidado de lingvaj kursoj, altruisme, senlace li kunlaboris kun LKK de la kongresoj de Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio, aranĝitaj en Hungario.

Intima amika konversacio sekvis la solenan primemoron. Je alvoko ĉiu partoprenanto prezentis personajn travivaĵojn koncerne al Jáki. Lia amiko kaj estinta kunlaboranto rakontis, ke sia tuta korpo tremadis, kiam ili estiĝis vid-al-vide dum la ŝtata lingvoekzameno, sed paralele kun la severeco de la ekzamenanto Ferenc Jáki tamen solvis la streĉitecon per sia *homa* amo.

Alia partoprenato rakontis, kiam dum urbovizito Jáki ĉiĉeronis, ofte li direktis la grupon al la interno de preĝejo, kaj tiukaze li finis la klarigon kun sia belvoĉa prezento de gregoria ĉanto. Iu partoprenanto fanfaronis pri tio, ke ŝi ricevis artan memorobjekton farita de Jáki, kion zorgeme konservas. Surprizis nin la demando de Ilona N. Petó; ŝi montris interesan objekton por agnoski tion. Neniu rekonis ĝin. Fine Ilona malkovris: ŝi ricevis tiun donace de Ferenc Jáki, ĝi estis ardeza tabuleto dum lia

elementlerneja aĝo, kiun ĉ. de dek jaroj ŝi konservas en la «'Szigethy Kolekto de Artobjektoj».

Senescepte ĉiu alparolanto emfazis la humanecon, la homan familiarecon, modestecon (li ne fanfaronis pri sia distingo 'Kavaliro de Hungara Kulturo'), humuron, rideton de 'Oĉjo Feri'. Kiom malalta estis lia korpa staturó, tiom granda li estis en sia korpanima esenco: *la* pastro, *la* instruisto/profesoro, *la* verkisto, *la* poeto, *la* skulptisto, *la* pentristo, *la* fotisto, *la* HOMO. Unuvorte: li estis „LA OĈJO FERi”.

En la fino de la primemora solenaĵo, Imre Domokos deklamis sian poemon:



Imre Domokos deklamas sian poemon

Domokos Imre:

KORUNK POLIHISZTORÁNAK

Deo gratias, hogy hű küldötte lettél,
 Romló világunkban hitet élesztettél.
 Jót, szépet becsülve, oktatta, művelv
 Átható erejű életednek elve:
 Kreatív munkával teremteni újat,
 Ismertetni közben az értékes múltat.
 Fotózva mutattad évszakok váltását,
 Eszperantóval a népek barátságát
 Remek verset írtál és fordítást, sokat
 Embert is faragtál, nemcsak faszobrokat.
 Nyolcvanegy évemet tevékenyen élted
 Centenáriumod ugyanígy tetézzed!

Imre Domokos :

AL POLIHISTORO DE NIA EPOKO

Deo gratias, ties deligit' iĝis,
 Reformon en raba mondo revivigis.
 Jen Jen bonon, belon takse agas,
 Akresona princip' de via voj' estas:
 Kun Krea laboro estigi la novon,
 Intertempe konigi taksan paseon.
 Fotante vi montris sezonalternadon,
 Esperante inter landoj amikecon.
 Raciajn poemojn, tradukaĵojn verkis
 Eĉ verhomon krom lignostatuoĵ skulptis.
 Navigantis jarojn okdekunu aĝe
 Centjara naskiĝtag' renkonti vin same.

János Patay

SPIRITAJ DESERTOJ

FURIOZULO KIAL KRIADAS?

Foje sur la bordo de rivero Gango iu bonzo preparis sin je laŭrita banado, kiam li ekaŭdis kriadi membrojn de familio unu kun alia. Ridetante li turniĝis al siaj disĉiploj kaj demandis: 'oni kial kriadas kiam ili estas koleregaj?'

Iu disĉiplo jene respondis: 'Kiam oni perdas sian memregadon, oni kriadas'.

Sed kial vi devas kriadi, kiam tiu staras apud vi, al kiu vi parolas? Vi povus mallaŭte diri al li, kion vi volas – diris la bonzo.

La disĉiploj ne trovis la respondon, kaj la bonzo klarigis jene:

Kiam oni koleras unu al la alia, ilia koro malproksimiĝas unu de la alia. Pro la distanco oni devas kriadi por ke ili aŭdu unu la alian. Kiom ajn ili estas furiozaj, des pli laŭte ili kriadas, ĉar des pli granda estas la distanco. Kiam du homoj ekamas unu la alian, ili ne kriadas, sed afable, milde ili dialogas, ja iliaj koroj estas tre proksime unu al la alia, ili ne havas distancon. Kiam pli amas unu la alian, ilia koro estas tre proksime unu al la alia, ili ne devas eĉ mallaŭte ekparoli, ili komprenas unu la alian per rigardo unu al la alia. Tiel malproksime ni staras unu al la alia, kiam amo ekzistas.

La bonzo rigardis al siaj disĉiploj, kaj tiel daŭrigis: 'kiam vi disputas, ne lasu malproksimiĝi viajn korojn. Ne elparolu tiujn vortojn, kiuj malproksimigas vin unu de la alia, ĉar cetera aperas tago, kiam tiom grandiĝas la distanco, ke vi ne trovos la rekondukan vojon.

Kompilis: **János Patay**

NAŬ JUGLANDOJ

En iu printempa, sed frostovetera tago altaĝa onjo staris ĉe la rando de la ŝoseo, sur ŝia kapo estis katuna tuko, en la mano saketo kaj kviete mansignis. Mi ekhaltis, enaŭtigis ŝin kaj ni komencis babili. Baldaŭ evidentiĝis, ke ŝi klopodas al la vendoplaco de Szentgyörgy por vendi nukson. Sen demando ŝi komencis rakonti.

„Dum mia infanaĝo kun mia avo ni plantis dek juglandarbojn. El la rivereto ni akvumis ilin. Unu el ili eĉ samjare sekiĝis, sed la ceteraj ekradikiĝis. La jaroj pasis, kaj la vivo fortrenis min

de la gepatra hejmo.

Dum iu trista tago mia avo mortis, mi vizitis hejmen por la enteriga ceremonio. Oni metis la katafalkon en la ombro de adoleskintaj juglandarboj. Dum la tuta ceremonio mute mi staris en la ombro de sveltaj arboj...

La jaroj pasis! Mi fariĝis emeritulo. Mi restis sola kaj mi transloĝiĝis al mia naskiĝvilaĝo, naskiĝdomo. Mi havas malaltan pension, aŭtune mi kolektas la nuksojn kaj vintre disrompas. Mi porciumas po duon-kilogramoj kaj tiel facile mi povas forvendi. Sur la vendoplaco neniam mi devis stari pli ol du horojn. Ĉu vi scias, ĉu ne, tiuj naŭ juglandarboj vintre helpis min. Ĉi-vintre el la profito de la nukso mi povis aĉeti ne nur brullignon, sed eĉ porketon. Se mi sukcesos vendi tiun ĉi restaĵon, mi deziras aĉeti dek juglandarbidojn. Mi havas ĉarman nepinon, baldaŭ ŝi vizitas ĉi-hejmen, ni plantos la arbidojn, kaj se ankaŭ ŝi maljuniĝos, certe ŝi preĝos por mi dum la nukso-disrompado ...”

Mia aŭto kuris en la printempa lumo. La onjo eksilentis, ankaŭ mi silentis, mute mi stiris. Baldaŭ mi bremsis ĉe la vendoplaco kaj haltis. Mia vojaĝanto kun sia tremanta mano enŝovis saketon da nukso sur la aŭtoseĝon. Mi protestis, sed kun milda rideto ŝi diris: eĉ prenu, ankaŭ la bonkora Dio donis al mi mian avon kiu plantis la juglandarbojn...

Senvorte mi ekrapidigis la aŭton, mi stiras, sed duonokule mi rigardas la nukson, nome la respondon de la simpla sikula virino je la monda ekonomia krizo.

Mi ekprenis la bele ligitan paketon, malligis ĝin kaj mi komencis kraketigi la delikatan kernon de juglando, la frukton de la honesta, dum jardekoj daŭranta laboro, la elegantan, trafan respondon je la problemoj de avino. Irebla vojo... Mi foriras kaj aĉetas dek jugland-arbidojn!

Kolektis: **Frato Csaba**

TAKSIO-AVENTURO

Antaŭ jardekoj mi estis profesia taksio-ŝoforo. Mi tre ŝatis tiun vivon, ja unuopaj pasaĝeroj prezentis interesajn travivaĵojn. Post iom da tempo mi konstatis, ke mia taksio fariĝis kvazaŭ iaspeca

konfesejo, ĉar dumvoje la pasaĝeroj babiladis, kvankam mallaŭte, tamen vole-nevole mi devis aŭskulti. Per tio oni ofte dividis intimajn aferojn al mi, kion dum brila tago, vid-al-vide ili ne parolintus pri tio.

Iu nokte mi alvenis je la adreso, kaj laŭkutime per hupado mi avizis mian alvenon. Post kelkaj minutoj refoje mi hupadis, ja tio estis mia tiunokta veturigo, mi estis laca, kaj mi hejmeniras, ĉar ne aperis la pasaĝero. Tamen mi pripensis, descendis, iris al la pordo kaj sonorigis. 'Momenton' – respondis delikata, maljuna sono el interno. Mi ekaŭdis, oni trenas ion sur la planko.

Post iom da tempo malfermiĝis la pordo, kaj ĉirkaŭ naŭdek-jara virineto aperis antaŭ mi. Ŝi portis simplan, katunan robon kaj ĉapeleton. Malgranda kofreo kuŝis apud ŝi. Mi ĵetis rigardon en la loĝejon, kaj ŝajnis, kvazaŭ neniuj loĝas en ĝi. Oni kovris la meblojn kun blankaj littukoj, sur la muro nek bildo, sur la breto nek unu dekorobjekto estis. En la angulo de la ĉambro skatolo ripozis plenigite kun ĉiusecaj fotobildoj kaj florvazoj.

„Ĉu vi elportus mian kofreton al la taksio? Dum kelkaj minutoj mi dezirus resti sola. Poste, se ankaŭ vi opinias, revenus al mi por akompani min al la aŭto. Mi ne havas sufiĉan forton.”

Post kiam mi metis la kofron en la pakujo de la aŭto kaj mi reiris, ŝi brakoplektis al mi. Malrapide, tre malrapide mi promenis al mia taksio. Dume ŝi dankadis pro mia afableco. „Neniaĵo” – mi respondis. Tiel mi zorgas kun mia ĉiu pasaĝero, kiel mi atendas, ke aliulo zorgu pri mia patrino.

“Kiel bonkora vi estas!” – ŝi diris. Ŝi donis al mi la adreson kaj demandis: “Ĉu ni veturus eble tra la interna urbo?”

“Ne tiu estas la plej mallonga vojo” – mi respondis rapide.

“Tio tute ne koncernas min” – ŝi diris – “Mi iras en hospic-ĥejmon.”

Mi rigardis en la retrospegulon. Larmoj brilis en ŝiaj okuloj. “Jam mi ne havas familion, ĉiu mortis.” – Ŝi parolis tre mallaŭte. – “Laŭ la sinjoro doktoro jam mi ne havas longan tempon.” Mallaŭte mi elŝaltis la taksimetron.

„Kion vi deziras? Al kiu direkto ni veturu?”

Dum la sekvaj du horoj ni travagadis la

urbon. Ŝi montris al mi tiun domon, en kiu antaŭ longe-tre longe ŝi laboris kiel fraŭlina liftisto. Poste ni vizitis tiun urboparton, kien laŭ novaj geedzoj ili transloĝiĝis. Antaŭ meblomagazeno ni ekhaltis momenton, kie ŝi klarigis, ke dum sia edziniĝmatura aĝo tiu funkciis kiel balejo, kaj kun siaj samaĝulinoj vizitis tion.

Foje-foje ŝi haltigis min ĉe iu angulo, antaŭ konstruaĵo. Nenion ŝi klarigis, nur ŝi revadis antaŭ sin. Kiam sur la horizonto aperis la unuaj radioj de la aŭroro, ŝi diris: „Jam mi povas iri. Mi laciĝis.” Senvorte ni veturis al la adresita loko. Ĝi estis malalta konstruaĵo.

Kiam ni alvenis, ĉe la ĉefenirejo du dungitoj aperis en uniformo. Ili ĝentile helpis, atentis ĉiun movon de la grandaĝa virino.

Mi deprenis la kofreton el la pakujo de la taksio kaj mi portis tion ĝis la pordo. La flegistoj sidigis mian pasaĝeron sur rulseĝon.

„Kiom mi ŝuldas?” – ŝi demandis kaj prenis sian monujon.

„Neniom” – mi respondis.

“Eĉ vi devas vivteni” – ŝi diris.

“Mi havas eĉ ceterajn pasaĝerojn” – mi pacigis ŝin.

Poste per abrupta ideo mi subfleksiĝis kaj brakumis ŝin. Kun surpriza forto ŝi premis min al si.

« Vi alportis grandegan ĝojon al oldulino.” – fine ŝi diris: “Mi dankas”.

Mi ekpremigus ŝiajn du manojn, kaj mi repromenis al la aŭto. Mi aŭdis, kiam malantaŭ mi fermiĝis la pordo de la domo. Oni fermis la pordon je ŝia vivo.

Sekvatage nur mi stiris, sencele. Mi ne transportis pasaĝerojn. Mi ne havis emon paroli. Ĉiam mi meditis pri tio: kio okazintus, se iu rabia ŝoforo estus veturiginta la oldan virinon? Aŭ iun senpaciencon? Aŭ kio okazintus, se mi mem estintus senpacienca, kaj sen frapeto de pordo mi estus foririnta?

Fine mi komprenis: dum mia tuta vivo mi ne faris pli gravan aferon, ol dum la antaŭa nokto.

Dum la tuta vivo oni atendas grandajn aferojn. Sed la grandaj aferoj kelkfoje aperas en surpriza maskovestaĵo: tiel ili estas pakite, ke kiu ne atentis, tiu eĉ ne konsciiĝas kiom gravan eblecon preterlasas.

Kolektis: **István Sutka**



La ĉefplaco de la urbo Vác, kie okazos la 45-a Landa Amika Fervojista E-Renkontiĝo



La 65-a kongreso de IFEF kaj la kongreso de UFE okazos de la 4-a ĝis la 11-a de majo 2013 en Francio en Artigues-pres-Bordeaux. Informojn kaj aliĝilojn oni povas ricevi de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio